Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

# Esperanto

116-a jaro • n-ro 1378 (4) | aprilo 2023

Reprezentantoj de UEA eklaboris, partoprenante en la 52-a sesio de la Homrajta Konsilio | 75

Torino malpacience atendas – ĉu vi jam aliĝis? | 76

Plenan monaton en Togolando kaj Benino kun Esperanto-plusanoj | 84

Ĉu survoje al nova Esperanto-urbo? | 89




ISSN 0014-0635

# Kolofono


## Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon, la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la evoluo de Esperanto en monda skalo.

★

Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon de UEA. Aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
https://revuoesperanto.org
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

**Legata en 120 landoj.**
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):
1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.
Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas minimume €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:
Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
tel.: +31-10-436-1044
uea@co.uea.org www.uea.org



# Enhavo



## 75

### Tri reprezentantoj de UEA eklaboris, partoprenante en la 52-a sesio de la Homrajta Konsilio

Ekde nun, posedante la ĉi-jaran enirpermesilon de UN en Ĝenevo, eblos al membroj de la UEA-teamo partopreni en la kompleta programo de venontaj eventoj.



## 76

### Torino malpacience atendas – ĉu vi jam aliĝis?

La Dua Bulteno aperis lastmonate – kaj sekve ankaŭ la reta mendilo, kun eblo mendi diversajn servojn, rilatajn al la 108-a Universala Kongreso en Torino, Italio.



## 84

### Plenan monaton en Togolando kaj Benino kun Esperanto-plusanoj

5 francaj geesperantistoj, el kiuj unu estas belgdevena, kaj deko da togolandaj esperantistoj kaj amikoj pasigis tempon kune por proponi lertigadon en la Instituto Zamenhof (Izo).



## 89

### Ĉu survoje al nova Esperanto-urbo?

Kelkdek kilometrojn sude de Barcelono situas la vilaĝo Sant Pau d'Ordal sufiĉe konata en Esperantujo, ĉar ĝi estis dum jaroj la sidejo de Muzeo de Esperanto...


**Laste Aperis** | 77
**Universala Kongreso** 51-a IIK invitas!
**ILEI | Movado** Ĉiuj kune: laborplano de ILEI, laborplano por la Movado | 78
**Kulturo** Teatraĵo "Rigardu, antaŭ ol salti" | 79
**Universala Kongreso** Revivu la montrealan kongreson! | 80
**Kulturo** Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 3-a eldono lanĉita | 81
**Eventoj** 5-a speciala Esperanto-ekskurso
La RenKEJtiĝo, sukceso de la Kataluna Esperanto-Junularo | 82
**Movado** Rekordulo en la Esperanto-movado en Hungario
**Oficiala Informilo** | 83
**Universala Kongreso** UEA kongresos en Aruŝo, Tanzanio, en 2024 | 87
**Informado** Libro de la japana entreprenisto Etsuo Miyoshi | 88
**Fake, Science kaj Profesie tra la mondo** Riĉa programo por IKU/SK 2023 k.a. | 90
**Faka agado** Bahaa Esperanto-Ligo 50-jara | 93
**Forpasoj** | 94
**La membraro de UEA en 2022** | 95



## Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto:** D-ro Duncan Charters (Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsah, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

**Vicprezidanto:** S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

**Vicprezidanto:** D-ro Amri Wandel (Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto, Terminologio, Meza Oriento kaj Norda Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

**Ĝenerala Sekretario:** S-ro Aleks Kadar (Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

**Membro:** S-ino Aurora Bute (Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândușei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timișoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

**Membro:** D-ro François Lo Jacomo (Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Ĝemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

**Membro:** S-ro Jérémie Sabiyumva (Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

**Membro:** D-ro So Jinsu (Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamseom Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

**Observantoj de TEJO:**
S-ro Albert Stalin Tancinco Garrido kaj S-ro Tyron Surmon

**Observanto de ILEI:**
Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi

**Pli detale ĉe:**
**http://www.uea.org/asocio/estraro**

# Tri reprezentantoj de UEA, el la Ĝeneva UN-teamo, eklaboris, partoprenante en la 52-a sesio de la Homrajta Konsilio

Alain Favre,
Nicole Margot
kaj Stefano Keller

Alain Favre, Nicole Margot kaj Stefano Keller, reprezentantoj de UEA ĉe UN en Ĝenevo, ĉeestis en la 52-a sesio de la Homrajta Konsilio la 10-an de marto 2023.

*La ĉefa temo de la tago estis:*

La defioj kaj ŝancoj por la plena praktikado de siaj rajtoj fare de infanoj en la cifereca medio – kiel laŭleĝaj kaj politikaj kadroj povas esti plifortigitaj por subteni la rajtojn de infanoj en la interreto – kun akompanaj protektaj aranĝoj.

La infanoj kaj junuloj devas esti defendataj kontraŭ pornografiaj retaj publikaĵoj kaj misuzoj, facile atingeblaj en la aktuala mondo. Ĉefe post la pandemia periodo de la viruso Kovim-19, kiam la uzo de retaj konektiĝoj – i.a. de gejunuloj – forte kreskis, plej ofte sen kontroleblo fare de plenkreskuloj, gepatroj.

La intervenantoj (ŝtatreprezentantoj, NRO-delegitoj, infanoj kaj junuloj) alvokis por pli efika protekto de la junularo kontraŭ tiaj krimaj misuzoj.

La retan ĉeeston de multaj infanoj uzis kaj daŭre uzas por siaj kontraŭleĝaj agoj diversaj pornografie aktivaj krimuloj, kontraŭ kiuj oni alvokis por apliko de severaj kontroloj kaj intervenoj, por savi la infanojn de gravaj prisanaj, mensaj konsekvencoj.




Ankaŭ la retkonektojn provizantaj kompanioj, firmaoj devus tre rapide enkonduki striktajn kontrolojn kaj reguligojn de uzebloj de iliaj servoj, cele al maksimuma protekto de la junularo kontraŭ tiaj krimaj agoj, detruantaj vivojn.

En alvoko de unu el la alparolantoj, ni aŭdis pri la neceso certigi ke la edukado de infanoj okazu en ilia gepatra lingvo, i.a. por ke ili bone komprenu la mesaĝon.

Stefano Keller informiĝis – ĉe kunlaborantino de la UN-oficejo por rilatoj kun NRO-reprezentantoj – pri la aktuale denove ebla ĉeesta partopreno en kunsidoj, kaj koncerne regulojn pri alparoloj.

Ekde nun, posedante la ĉi-jaran enirpermesilon de UN en Ĝenevo, eblos al membroj de la UEA-teamo partopreni en la kompleta programo de venontaj eventoj, kaj ĉefe en ties lingvorajte rilataj diskutoj, per alparola interveno (laŭ novaj reguloj).

# Torino malpacience atendas – ĉu vi jam aliĝis?

La Dua Bulteno aperis lastmonate – kaj sekve ankaŭ la reta mendilo, kun eblo mendi diversajn servojn, rilatajn al la 108-a Universala Kongreso en Torino, Italio.

Peter Baláž, Kongresa Fako

**Dua Bulteno:**
ĝi troveblas rete ĉi tie: *https://uea.org/kongresoj*, rekte en tri versioj: en PDF en pli peza kaj malpli peza versioj kaj ankaŭ rekte foliumebla versio. La Bulteno enhavas gravajn informojn pri la urbo kaj lando – kaj ĉefe superrigardon pri la elektitaj tranoktebloj, kiujn UEA rekomendas dum la kongreso. Aldone certe oni tralegu la proponitajn ekskursojn – kiuj ja estas kaj tre allogaj kaj buntaj – ŝajne la kongresa semajno estos tro mallonga por "gustumi" Italion plene :).




**Mendilo:**
Reta mendilo venis retpoŝte al ĉiuj, kiuj aliĝis al la kongreso (kaj pagis la kotizon). Pere de ĝi eblas facile mendi plurajn servojn, proponatajn por la UK (tranoktoj, ekskursoj, bankedo). Granda pluso de tiu ĉi reta mendilo: oni povas (okaze de bezono) modifi la mendon rekte tie, ne bezonatos do aparta/aldona informado al la Kongresa Fako.

**Hoteloj:** La hotela elekto estas en Torino bunta kaj varia, do ĉiu povos trovi en ĝi taŭgan tranoktejon. La dua Bulteno proponas ĉefe 3- kaj 4-stelajn hotelojn, konsciante pri iliaj kvalito kaj disponeblaj servoj. Ĉiuj proponitaj hoteloj estis persone vizititaj kaj testita la kvalito de ili. Certe ĉiu el la hoteloj havas iun iom alian aldonan valoron – oni do jam elektu laŭ siaj preferoj kaj bezonoj (kelkaj estas pli proksime al la kongresejo, aliaj pli proksime al la urbo-centro. Iu proponas naĝejon, alia parkejon).

**Studenthejmoj:** Ankaŭ ĉi-jare ne mankas la propono de eĉ pluraj studenthejmoj – por gastigi partoprenantojn, kiuj preferas tian ĉi tranokteblon. La studenthejmoj situas en diversaj partoj de la urbo kaj havas malsamajn avantaĝojn – tial ni rekomendas bone tralegi la Duan Bultenon kaj eventuale konsulti retan mapon de la urbo, por havi pli bonan imagon.

**Amasloĝejo:** kelkaj certe scivolemas pri la plejeble malkosta tranokteblo. Bona novaĵo estas, ke jes ja tia eblo estas planata kaj nun preparata – pretiĝas spaco por minimume 50 personoj – kun 50 litoj – la detaloj aperos iom pli poste, kiam solviĝos la definitiva loko por ĝi.
(Ni sciigos pri tiu eblo ankaŭ tra niaj sociaj retoj – jen do, se vi ankoraŭ ne "ŝatas" la FB-paĝon de la kongreso, bona kialo eki: *https://mallonge.net/xw*.)

**Ekskursoj:** Agrable surprizis granda interesiĝo pri la ekskursoj dumkongresaj – ekz. tiu al Ĝenovo jam estas efektive elĉerpita! (Aperas plano aldoni ĝin ankoraŭ sabate, dum la alventago.) Tamen certe vizitindas ankaŭ ĉiuj aliaj ekskurso-lokoj – ja Italio plenegas je belegaj vidindaĵoj, historiaj monumentoj kaj vizitindaj lokoj, kien ajn oni iras. La fina elekto do estas je vi – kara partoprenonto – ni antaŭĝojas renkontiĝi en Torino!



# Laste Aperis

**De Esperantoplaco al Hasenheide / Vom Esperantoplatz zur Hasenheid. Vojaĝo tra Berlino kaj ĝia Esperanto-kulturo / Reise durch Berlin und seine Esperanto-Kultur.** Fritz Wollenberg. Berlin: Eldonejo Fritz Wollenberg, 2022. 100p. 21cm. ISBN 9783982396521. Dulingva, kolorilustrita urbogvidilo. Dua volumo. € 7,50

**Esperanto-lietuvių kalbų žodynas / Esperanta-litova vortaro.** Gediminas Degėsys. Vilnius: La aŭtoro, 2022. 483p. 20cm. ISBN 9786098248173. Unudirekta vortaro kun ĉ. 40 000 kapvortoj. € 24,00

**Horo 25, La.** Constantin Virgil Gheorghiu. El la rumana trad. I. Oneț. Novjorko: Mondial, 2022. 365p. 22cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 61. ISBN 9781595694393. Skua romano, parte membiografia, pri la hororoj de la milito. € 26,70

**Kiu serĉas, trovas / Aki keres, talál.** István Nemere. Nyíregyháza: Verda Stelo Esperanto-Asocio, 2021. 74p. 21cm. Dulingva: hungara, E. ISBN 9786150132303. Ekscita krimromano. € 6,90

**Libro por BET-ano.** Kompilis P. Jegorovas, A. Korĵenkov. Kaunas: LEA, 2022. 148p. 21cm. Ilus. ISBN 9786099631608. Eldono por la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, Klaipėda, 2022. € 6,00

**Malbela knabineto, La.** Veronika Marék. En Esperanton trad. J. Sárközi. Nyíregyháza: Verda Stelo Esperanto-Asocio, 2022. 52p. 14cm. Bind. ISBN 9786150164670. Kortuŝa rakonto pri knabino kies revo plenumiĝas helpe de veraj amikoj. € 10,20

**Noveloj kaj rakontoj.** Henryk Sienkiewicz. En Esperanton trad. div. Lublin: Ars libri, 2023. 852p. 24cm. Bind. ISBN 9788363698645. Trideko da noveloj el la plumo de pola Nobel-premiito pri literaturo. Esperantigis dekduo da tradukantoj, de Grabowski ĝis Kotowski. € 75,00

**Santeni vian vivradikon.** Wang Disheng. Fu Tai Estate: China Culture Development Press, 2021. 206p. 21cm. ISBN 9789887869658. Kiel teni sana nian korpon laŭ la tradicia ĉina medicino. € 18,90

**La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA**, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe *www.uea.org/katalogo*.

## Universala Kongreso

# 51-a Internacia Infana-Adoleskanta Kongreseto (IIK) invitas!



Lige kun la 108-a UK en Torino okazos samtempe, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023, ankaŭ la 51-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) meze de la Parko La Mandria, apud Torino, Piemonto, Italio. Bonvenon viziti la retejon de IIK: *http://iik.uea.org*.

La temo de la kongreseto estas "Sporto kaj Naturo".

La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto en natura medio. Okazos ludoj kaj sporto, natursciencaj ateliero kaj biciklado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vesperaj ludoj kaj interesaj vesperaj agadoj atendos la infanojn kaj adoleskantojn. Eksciu pli pri la programo.

IIK bonvenigas partoprenantojn de diversaj aĝogrupoj, kiuj parolas Esperanton (minimume – scipovas baze kaj klare esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto):

- infanoj kaj adoleskantoj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj
- adoleskantoj ekde 17 jaroj kaj fluparolantaj povas fariĝi helpantoj
- infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron/prizorganton/vartiston dum IIK.

En la retejo vi trovos pliajn informojn kaj la aliĝilon, kie ĉiu infano povas indiki siajn ideojn por la programkontribuoj, kio certe eĉ pli riĉigos la eventon. Pri ajnaj demandoj bv. skribi al *infana.kongreseto@gmail.com*. Aliĝu frue – la unua speciala aliĝperiodo finiĝis jam fine de februaro!

Ni ankaŭ invitas vin subteni la partoprenon de infanoj/adoleskuloj el nepagipovaj landoj en la IIK per mona donaco al la kongreseto (*uea.org/alighoj/donacoj*. UEA-kontoj: Adoptaj Gepatroj kaj Infana kongreseto). Ni kore dankas ĉiujn donacantojn.

**Bonvenon al la Torina IIK!**

# Ĉiuj kune: laborplano de ILEI, laborplano por la Movado

Ahmad Reza Mamduhi

Post longaj kunpensadoj kaj diskutoj unue inter la estraranoj kaj poste en la Komitato de ILEI, la nova Laborplano (*https://mallonge.net/xu*) aprobiĝis dum la 55-a kunsido de la Komitato en la 10-a de decembro 2022. Kiel videblas, la plejmulto de la laborplaneroj estas por antaŭenigado de la tuta Movado.

Sekve de antaŭaj kunsido kaj konsentoj pri tri-lateraj kunlaboroj de UEA, TEJO kaj ILEI, jam okazas novaj planoj, i.a. pri kunkongresoj en 2023 kaj 2024. Kaj nun, ankaŭ por la realigado de la laborplaneroj de ILEI, ĉiuj funkciuloj kaj membroj de UEA kaj TEJO estas invitataj por fruktodona kunlaborado.

Ekpost la aprobo, denove multaj retdiskutoj okazis por ektrovi kiel plej efike la enhavo de la Laborplano povas realiĝi. Nun feliĉe kaj danke al ĉies helpoj kaj konsiloj, pleje deflanke de prof. Renato Corsetti, jam pretas kadro por efika traktado de ĉiuj eroj de la Laborplano.

Por pli efika aliro al la plenumado de la ambicia 38-era Laborplano, ĝi estas rearanĝita en 6 grupojn. Ĉiu grupo de la laborplaneroj estas iel similaj, laŭaj kaj/aŭ kompletigaj unu al la aliaj. Ekzemple atento-fokuso de la Grupo 5 estas instruado, la ĉefa tasko kaj misio de ILEI – kiu fakte temas pri la bazo de nia tuta movado kaj ĝiaj pluvivado kaj evoluado.

Por ĉiu grupo de la laborplaneroj okazos ILEI-forumo, en kiu ĉiuj, kiuj jam helpas aŭ deziras kontribui, povos partopreni kaj paroli pri siaj ideoj, proponoj kaj agoj. Espereble tiel, la celoj de la Laborplano estos pli rapide kaj pli efike atingeblaj.

Ekde nun vi povas pensi kiel vi (kaj viaj asocio, klubo kaj/aŭ konatoj) povas kontribui al realigo de eĉ unu el la laborplaneroj. Jam ni ricevas helpajn proponojn, ekzemple Stano Marĉek, tre malavare donacis bitajn versiojn de sia fama lernolibro *Esperanto per Rekta Metodo* al la projekto Esperanto-kursaro Tibor Sekelj (EtoSo: *https://www.espero.ir/eo/kursaro/*), kadre de kiu vi povas en la pagita Zoom-konto de IrEA ekinstrui Esperanton – kaj ties registraĵoj (laŭ via elekto) povas alŝutiĝi en la jutuban kanalon de ILEI por ĉiama kaj ĉiesa utiligo.

La temo, dato kaj horo de ĉiu ILEI-Forumo anonciĝos en la retejo *ilei.info* kaj diversaj sociaj komunikiloj.

## Aprobita Laborplano de ILEI laŭ grupoj de similaj temoj

**Grupo 1: Internaj kaj rutinaj taskoj**

1) Restarigo de la administra sistemo de ILEI kaj prizorgado de la vivo de ILEI de la administra vidpunkto
2) Renovigado de la retejo de ILEI
3) Dokumentado de la renovigado de la retejo de ILEI
4) Kreado de la paĝoj pri IPR kaj JA en la retejo de ILEI
5) Regula prizorgado de la retejo de ILEI

**Grupo 2: Eldonaĵoj, retaĵoj, kunsidoj kaj interrilatoj**

6) Publikigado de IPR
7) Publikigado de JA
9) Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (15-an de decembro)
11) Realigado de libro pri Premio La Torre, se eble kun la ISBN-kodo de ILEI
12) Publikigi la librojn de la Aktoj de la ILEI-simpozioj 2020-1, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI
13) Publikigi aliajn librojn pri ILEI kaj/aŭ edukado, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI
14) Daŭre verki trimonatajn raportojn
15) Teni bonajn rilatojn kun UEA
16) Teni bonajn rilatojn kun TEJO
24) Daŭre okazigi ĉiumonatajn renkontiĝojn de universitatanoj
25) Daŭre okazigi ILEI-forumojn
27) Prizorgado de la jutuba kanalo de ILEI
28) Prizorgado de la aliaj retaj sociaj komunikiloj de ILEI
29) Daŭrigado kaj perfektigado de la “Homa Ĉeno”

**Grupo 3: Kongresoj kaj kongresaĵoj**

21) ILEI-kongreso de Linjano (2023)
22) ILEI-simpozio de Linjano
23) Sekva ILEI-kongreso (2024)
26) Instruista trejnado dum la kongreso ktp.
10) Dezirinda okazigado de plua eldono de Premio La Torre

**Grupo 4: Revuoj kaj ekzamenoj**

36) Pripenso pri evoluo de la kotizsistemo, interalie por kovri la defi-



citon de la papera servo kaj por ke bazaj/retaj membroj ne pagu por papera servo kiun ili ne bezonas
37) Pripenso de nova formato por IPR (reta/papera) por pli bone taŭgi kun la nunaj bezonoj
38) Pripenso pri la bezonoj de lernejaj instruistoj (membroj kaj (ankoraŭ) nemembroj); ĉu *Juna Amiko* sufiĉas?; kiaj servoj de ILEI helpus ilin?
8) Ekzamenoj de ILEI/UEA

**Grupo 5: Instruado**

17) "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la tuta mondo": plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso
18) "Esperanto-kursaro Tibor Sekelj rete": starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo
19) Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton "30 Oraj Horoj" en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon
20) Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la "30 Oraj Horoj" en almenaŭ tri landoj krom Italio
30) Prezenti Esperanton al almenaŭ 3 NROj, precipe pri paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj
31) Batali kontraŭ analfabeteco per instruado de Esperanto almenaŭ en unu lando
35) Sendado de lernolibroj al Afriko

**Grupo 6: Eksteraj rilatoj**

32) Sendi observantojn al Unesko por videbligi niajn agadojn tie kaj klopodi akiri oficialan kunlaboran rilaton. Daŭre videbligi la projektojn jam plurlingve prezentitajn por la pasinta premio Hamdan (Kungfua Kunikleto, 30 Oraj Horoj, *Edukado.net*)
33) Se eblas, partopreni en la venonta premio Hamdam pri edukado kun taŭga kandidato
34) Pretigi varbadajn materialojn pri ILEI por Unesko ktp.

## Kulturo

# Teatraĵo "Rigardu, antaŭ ol salti"

Tatjana Auderskaja

La 15-an de februaro 2023, en la Arta centro "Teatro de Peruckij", Odeso, Ukrainio, okazis unika evento en la kultura Esperanto-vivo. Estis surscenigita per profesia teatro verko, originale kreita en Esperanto kaj poste tradukita al nacia lingvo. Mi konas kelkajn okazojn, kiam nacilingvaj teatraĵoj estas tradukitaj al Esperanto: ekde "Halka" en 1912 ĝis "Sternenhoch" en 2018. Sed, ŝajne, ankoraŭ neniam origina esperantlingva teatraĵo aperis sursceneje nacilingve.






Temas pri la teatraĵo "Rigardu, antaŭ ol salti" de Harold Brown (1925 – 2004). Harold Brown estas angla verkisto, eseisto, dramaturgo, kiu la lastajn 19 jarojn de sia vivo loĝis en Svedio. Li verkis en la angla, la sveda kaj Esperanto. La verkaro *Eduko danĝera* aperis en Svedio en la jaro 2006. La libron donacis al mi la vidvino, Kerstin Rohdin, kun kiu mi konatiĝis en 2008 dum la arta festivalo "Aroma Jalto". El la verkoj de la libro mi elektis ĝuste tiun teatraĵon, ĉar ĝi estas vigla kaj ironie humura, dum aliaj temis pri "seriozaj", mornaj aferoj. Kaj ekde tiam, ekde 2008, mi estis serĉanta kaj persvadanta diversajn reĝisorojn kaj teatrodirektorojn ekokupiĝi pri la verko. Kaj fin-fine, mi sukcesis!



# Revivu la montrealan kongreson!

Ĵenja Amis



Malfacilas kredi, ke jam pasis pli ol ses monatoj ekde la Montreala UK (aŭgusto 2022)! Por travivi (aŭ revivi, se vi partoprenis!) la neforgeseblajn momentojn de la unua kongreso post la longa tri-jara paŭzo spektu du filmojn pri la 107-a Universala Kongreso en Montrealo.




La unua estas filmita kaj reĝisorita de Rogener Pavinski, el Brazilo (*mallonge.net/2022-filmo1*). Rogener estas konata Esperanto-muzikisto kaj antaŭa redaktoro de *Kontakto*, premiita de UEA per diplomo pri Elstara Agado pro kontribuoj al muzika kulturo. La 18-minuta filmo de Rogener bonege transdonas la etoson kaj la enhavon de la kongreso kaj estas bonega reklamilo


Bankedo

por Esperanto ĝenerale. Kiel vi atendus, muziko kaj arto ĝenerale estas ege grava parto de la filmo. La filmo de Rogener havas subtitolojn portugale kaj france. Se vi interesiĝas aldoni subtitolojn el aliaj lingvoj, kontaktu Rogener (adreso haveblas per la redakcio).


La duan filmon realigis estrarano de UEA, So Jinsu (Koreio) – konata al multaj esperantistoj ankaŭ kiel kongresa fotisto kaj filmisto (profesie So Jinsu estas ekonomikisto). La 26-minuta filmo de So Jinsu (*mallonge.net/2022-filmo2*) bonege kompletigas la filmon de Rogener – ĝi montras al la spektantoj la kongreson tagon post tago. Spektante la filmon, vi sentos kvazaŭ vi mem travivis la kongreson tagon post tago kaj eron post ero, travivante ĝojojn kaj feliĉajn momentojn, kiujn spertis kongresanoj.

Ĉar ni parolas pri la kongresaj filmoj, mi aldonu, ke la teatraĵo "1910" pri la vizito de Zamenhof al Ameriko en 1910, kiu ricevis starantajn aplaŭdojn, havas subtitolojn ne nur Esperante, sed ankaŭ angle, france, hungare kaj plej lastatempe hispane! Pli ol 3000


Unuafojaj Kongresanoj

personoj jam spektis ĝin. Se vi interesiĝas aldoni subtitolojn en aliaj lingvoj, kontaktu Alekson Miller (adreso haveblas per la redakcio). La filmeto troviĝas ĉi tie: *mallonge.net/1910.*






Ĉu vi volas fizikan kopion de la libro "Amo, tuso kaj forpaso"?

Tuj mendu ĝin ĉe KAVA-PECH aŭ la libroservo de UEA!

# Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 3-a eldono lanĉita kun nova temo kaj novaj lingvoj

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) revenas kun la temo ***La sekreta vivo de miaj najbaroj***. La tria eldono de la konkurso estis lanĉita de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio. La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj.

Krom la temo ***La sekreta vivo de miaj najbaroj***, du novaĵoj atendas la partoprenantojn en la ĉi-jara Interkultura Novelo-Konkurso: nun eblas konkursi per ses lingvoj kaj estas dek monpremioj por gajni.

Krom Esperanto, la itala, la rusa kaj la ukraina, kiuj estis akceptitaj en la dua eldono, aldoniĝas ĉi-jare la kataluna kaj la persa. Tamen tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas.

La noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi maksimume 2000 vortojn (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longeco. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado; ties uzon oni devas mencii en la sendoformularo. Konkursi eblas per du noveloj.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 109-a Universala Kongreso de UEA en 2024. En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de septembro 2023.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: *bobelarto.ink/konkurso*.

Kadre de la dua eldono, kies temo estis *Nokta vojaĝo*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 421 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 39 landoj. La ĵurio aktuale laboras pri la juĝado de la selektitaj noveloj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 108-a UK, okazonta en Torino (29 julio-5 aŭgusto 2023). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: *uea.org/kongresoj*.

*Amo, tuso kaj forpaso*, la novel-rikolto de la unua eldono de la konkurso, estas aĉetebla en la Libroservo de UEA kaj ĉe la eldonejo KAVA-PECH.

Eventoj


# 5-a speciala Esperanto-ekskurso

Navin Shrest




La 5-a speciala Esperanto-ekskurso okazis en Nepalo en Kathmandu, Pokhara kaj ĉirkaŭa loko ekde la 26-a de februaro ĝis la 9-a de marto 2023.

Pro la pandemio kaj konfliktoj partoprenis nur 1 kanadano kaj 4 japanoj krom 20 nepalanoj, sed bonorde kaj amike okazis la renkontiĝo. La partoprenantoj ricevis diplomojn pri la partopreno la 8-an de marto 2023. La programo okazas ĉiujare en Nepalo.



Eventoj

# La RenKEJtiĝo, sukceso de la Kataluna Esperanto-Junularo

Enric Pineda i Traïd

La pasintan semajnfinon, de la 24-a ĝis la 26-a de februaro, okazis en Manresa la unua RenKEJtiĝo, renkontiĝo de junaj katalunaj esperantistoj. Tiu ĉi renkontiĝo, organizita de Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) kadre de la Fira de l'Aixada en Manrezo, funkciis kiel renkont-punkto ne nur por la kataluna junularo, sed ankaŭ por aliaj movadanoj de la tuta Eŭropo.

Ĉirkaŭ sesdek aliĝintoj, venintaj de diversaj lokoj de Eŭropo kiel Germanio, Belgio, Francio, Hungario, Italio kaj Hispanio, povis ĝui la programon organizitan de la LKK, kiu inkluzivis gvidatajn vizitojn al la urbocentro de Manrezo, rilatajn al la historio de akvo en la urbo, vizitojn al emblemaj lokoj kiel la groto de Sant Ignasi, kaj ekskursojn ĉirkaŭ la urbo. Samtempe, KEJ organizis du kursojn de Esperanto, unu por komencantoj kaj la alian por meznivelanoj. La aliĝintoj povis ankaŭ interkonatiĝi per diversaj agadoj kiel la tradicia "dolĉa trinkomanĝa nokto", nokto dum kiu oni manĝas dolĉaĵojn kiuj venas el la regionoj aŭ landoj de la aliĝintoj.

Laŭ la prezidanto de KEJ, Jordi Calafí, "delonge KEJ ne sukcesis kunigi tiom multajn homojn, kaj neniam okazis tiom da internacia partopreno en iu junulara evento en Katalunio." Tiu ĉi sukceso certe instigos organizi pli da renkontiĝoj frue.



Movado

# Rekordulo en la Esperanto-movado en Hungario

Katarina Faragó

D-ro Imre Ferenczy estas Rekordulo en la Esperanto-movado en Hungario. Li laboris en la hungara kaj internacia Esperanto-movado seninterrompe 72 jarojn (1950-2022) kaj partoprenis 39 Universalajn Kongresojn de Esperanto. Antaŭnelonge li gajnis la titolon: la plej longe aktiva esperantisto. La eldonita memordiplomo subtenas la eksterordinaran agadon kiel aŭtentika pruvo por la posteularo. D-ro Imre Ferenczy dum la 88-a UK (Gotenburgo 2003) estis elektita: Honora Membro de UEA.




*D-ro Imre Ferenczy en sia hejmo en la urbo Győr kun la Diplomo. La foton faris: Ádám Rákóczy (urbo Győr)*

## Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



**DUMVIVAJ MEMBROJ**
*Meksiko*: A. Aguilar y Aguilar.
*Portugalio*: D.J. Viegas Gonçalves.

**SOCIETO ZAMENHOF**
*Ĉeĥio*: J. Kalčík.
*Danio*: K. Jørgensen.
*Finnlando*: S. Mattlin.
*Francio*: N. Kesler.
*Japanio*: Kuroyanagi Y., Kuzume S.
*Kanado*: M.T. Fettes, R.J. Williamson.
*Korea Resp.*: Park S.
*Nederlando*: D. ten Haaf.
*Svedio*: S. Svenonius.
*Usono*: D.K. Jordan, J. Kalilich, C.O. Mays, W. Murawski, J.R. Nogueras, D. Power, O.E. Raola.

**ALIANCO 365**
*Italio*: G. Fighiera.
*Kanado*: G. Evans.
*Korea Resp.*: Park S.
*Nederlando*: G. Peet.
*Usono*: D. Power.

**PATRONOJ de TEJO**
*Aŭstralio*: B. Lang.
*Belgio*: X. Blommaert.
*Ĉeĥio*: M. Malovec.
*Finnlando*: B. Eriksson, A. Karkiainen, T. Oittinen.
*Francio*: B. Despiney, F. Soghomonian.
*Germanio*: K. Klat, F. Reisel.
*Japanio*: Syôzi N.
*Kanado*: M.T. Fettes.
*Nederlando*: D. ten Haaf.
*Pollando*: M. Hebdzyński, R. Williams.
*Svedio*: O. Pettersson.

**DONACOJ**
ĝis la 5-a de marto 2023

**Amsterdama Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto**
*Nederlando*: Esperanto Nederland 250,00.
Sumo ĉi-jara: 600,00.

**Fondaĵo Afriko**
*Svedio*: M. Häggström 40,00.
Sumo ĉi-jara: 261,20.

**Fondaĵo Ameriko**
*Britio*: M. Sims 89,32.
Sumo ĉi-jara: 120,76.

**Fondaĵo Azio**
*Japanio*: Aihara M., Hayashi K., Kitani T., Kudou T., Matumoto T., Mijazaki H., Nisinaga A., Sasanuma K., Syôzi N., Yamaguti H., Yosikawa S - po 18,26.
Sumo ĉi-jara: 208,86.

**Fondaĵo Canuto**
*Germanio*: H.-W. Sprick 50,00.
*Luksemburgo*: I. Ertl 20,00.
*Nederlando*: R. Moerbeek 25,00.
*Svedio*: M. Häggström 40,00.
*Svislando*: C.-C. Robin-Georget 40,49.
Sumo ĉi-jara: 565,49.

**Fondaĵo Partoprenu UK-on**
*Francio*: C. Common 10,00.
Sumo ĉi-jara: 92,00.

**Ĝenerala Kaso**
*Britio*: A. Pepperdine 11,17; A. Prent 36,85.
*Div. malgrandaj*: 6,00.
Alianco 365: 2007,94.
Sumo ĉi-jara: 3922,13.




*La puno por hipokrituloj (tranĉado de karno), persa miniaturo*

ESPERANTO TUITION GRATIS: THE INNOVATION FACTORY
322 King William st Adelaide 0448515234 pdesailly@hotmail.com
UN Multilingualism 2023: https://www.un.org/en/library/whyitmatters

Anonco

Nescieco de juneco afliktas nin ĉiujn de tempo al tempo, ĉu ne? Tio tamen en plenaĝeco fariĝas tute neakceptebla ĉe bahaano ĉar la plej supera principo de la Bahaa Kredo estas, ke oni memstare esploru la veron por si mem en nia religio, kies gvidantoj estas demokratie elektitaj laikoj. Kaj do, bonvolu helpi min en 2023 esperantigi 1000 junajn bahaajn plenkreskulojn en 100 landoj ĉar novaj lernadoj demonstras, kaj eĉ per dedukta rezonado pruvas, ke Baha'u'llah antaŭenigis Esperanton jam en 1890. ☺

**HIPOKRITECO EN RELIGIO - KIAL?**
Tute nova dulingva eseo de
pauljdesailly@gmail.com
*https://www.bandeeducation.com/hypocrisy-in-religion*



# Plenan monaton en Togolando kaj Benino kun Esperanto-plusanoj

Adjévi Adjé

Plenan monaton, t.e. de la 16-a de januaro ĝis la 15-a februaro 2023, 5 francaj geesperantistoj, el kiuj unu estas belgdevena, kaj deko da togolandaj esperantistoj kaj amikoj pasigis kune por proponi lertigadon en la Instituto Zamenhof (IZo) pri edukado al infanoj, kunvojaĝi, konatiĝi kun organizitaj grupoj da virinoj kaj da kuiristoj en ilia medio, partopreni en Esperanto-aranĝoj, iri renkonte al junaj entreprenemuloj, viziti esperantistojn, malkovr(ig)i vidindaĵojn kaj kuriozaĵojn, kaj kompreneble ankaŭ por reklami Esperanton. De la beninaj urboj Porto Novo, Kotonuo, Ouida kaj Lokossa ĝis la togolandaj: Aneho, Kpalime, Lomé, la renkontoj estis riĉaj kaj buntaj, montrantaj Afrikon moviĝantan, for de kliŝoj!

Jam dum la unua tago de sia restado, post matenmanĝo Evelyne Rotellini, Brigitte Marlier, Anne Larive, Jean-Pierre Marcq kaj Moroy E. Bergère akompane de mi vizitis IZon, kie restados Brigitte M. dekon da tagoj antaŭ ol revojaĝi al Francio. Brigitte estas kunordiganto de la reto Paroli, Legi, Skribi (PLE – en la franca) sen limoj kaj specialisto pri instruado de la franca lingvo al infanoj. Sian multjaran sperton en la instruado ŝi dividis lertige kun la geinstruistoj de IZo dum sia tiea restado kaj kun esperantisto-instruistoj. Menciindas, ke IZo estas partnero de la eduka subtena reto PLE de antaŭ 18 monatoj.

La frua reveno de Brigitte al Francio malfermis alian parton en la programo de ŝiaj kunvojaĝintoj: viziton al Benino, deziron tiom longe nutrita! Jen okazis konsultiĝo kun togolandanoj, konstruo de vojaĝplano por Benino. Kontaktoj estis faritaj kun la centro Songhai, kie ni celis tranokti kaj rapide rezerviĝis ĉambroj por entute 12 personoj kaj du infanoj! Jes, aldoniĝis al la grupo aliaj togolandanoj invite de niaj 4 bonkoraj kaj subtenemaj gastoj.

Post privizaj formalaĵoj ĉe la landlimo Hilakonĝi, jen ni enbusiĝis al Porto Novo kun halto ĉe Nikoe Konĝi, kie pacience atendis nin niaj esperantistaj amikoj de Kleve (Togolando), Dégbe Agossou kaj Dégbe Zinsou, por kunvojaĝi kun ni. Iom longa estis la vojo, sed preskaŭ neniu rimarkis tion. La pejzaĝoj paradis tra la fenestroj de la aŭto, deziro de ni (re)malkovri, lerni – fojfoje rompita per interbabiladoj – superis iun alian deziron, ĝis ni alvenis en la centro Songhai! Ekkonatiĝo kun la ĉambroj, rendevuo por renkontiĝi kun la fondinto de Songhai, serĉo de loko, kie matenmanĝi afriktipe la postan tagon kaj komuna vespermanĝo en la korto de nia gastejo fermis la tagon en reunuiĝa etoso des pli, ke ni ne ĉiuj veturis per sama aŭto. Ni vojaĝis per du busetoj.

Post trankviliga nokto, ni retrovis nin en gajeco fine ĉe okcidentstila matenmanĝo. Poste ĉe la akceptejo, kien vizitantoj unue iras, atendante instrukcion de la gvidisto antaŭ ol li vizitige konatigu pri Songhai. Momenton da pacienco kaj aperis junulo. Li havis respondecon vizitigi al homoj malsamajn departementojn kaj aktivaĵojn en la centro. Tiel ni povis dum pluraj horoj ne nur konatiĝi kun primara produktado (planta, besta kaj fiŝbredado), agroindustrio (danke al mekaniko kaj fabrikado de agrikulturaj maŝinoj) sed ankaŭ surloka prilaborado de produktoj el agrikultura produktado.

La restado en Porto Novo kroniĝis per valoraj atingoj, el kiuj memorindas la renkontiĝo de la tuta grupo kun la fondinto de Songhai, nome Godfrey Nzamujo, en unu el la konferencejoj de la centro. Estis tiom atendita momento! Post enmanigo donace de verbena arbido kaj kalendareto de Esperanto al la fondinto, respektive de Jean-Pierre





kaj Evelyne kaj dankesprimoj de la ricevinto, la interparoloj en la franca okazis pri aktualaj temoj kiel elmigrado, junuloj kaj ebloj en Afriko. Ĉiuj povis esprimi sin, libere, simple, frate aŭ pasive sekvi la diskutojn, ĉe kies fino grupe ni fotiĝis ekstere kaj ĝisrevidis unu la alian, kun espero revidi nin iam kaj ie en Esperantujo. Jes, Godfrey montris sian entuziasmon pri Esperanto kaj eĉ legis kelkajn vortojn en ĝi.

Celante viziton al esperantistoj, ni en Kotonuo gastis en la hotelo JoCa, kie regule okazis Esperanto-aranĝoj. Bedaŭrinde ni ne povis renkonti ĝian direktoron Tchikpè Privas, malgraŭ pli frua anonco pri nia vizito al li. Li tiam estis malsana kaj ricevis kuracistajn flegojn ekster la urbo. Ni do kontaktis Francis Agbénou, kiu venis renkonti niajn geamikojn, al kiuj li prezentis pri siaj surlokaj agadoj en Benino.

Por iom eskapi la modernan civilizadon, ni intertempe ekskursis al la ege interesa vilaĝo Ganvie. Tiu ĉi estis kreita, kiam en la regiono oni kaptadis sklavojn. Grupo da loĝantoj forkuris al eta insulo meze de la lago kaj tie kreis vilaĝon. Kiam ekmankis loko sur la insulo, oni komencis konstrui domojn sur palisoj super la akvo-nivelo. Nun plejparto de la vilaĝo estas sur la lago.

La lasta etapo de la vojaĝo en Benino kondukis nin al Lokossa, kun halto en la historie grava urbo Ouida kun vizito al la templo de pitonoj kaj promenado laŭ la vojoj de sklavoj ĝis ilia enŝipigo. Tragika momento… tian etoson ni sentis en la urbo, kiu servis kiel kolektejo por sklavoj. En Lokossa, la hejmurbo de Esperanto en Benino, tamen ne eblis tiam renkontiĝi kun multaj esperantistoj. Kelkaj el ili deĵoris fore kaj revenas nur semajnofine, dum aliaj estis ekster la urbo pro vojaĝkialoj. François Hounsounou tiuvespere povis liberiĝi post sia laboro kaj vizitis nian hotelon. Kun li ni trankvile interŝanĝis, parolis pri Esperanto kaj foje ankaŭ ridis sen malhelpi fotiĝojn.

La postan tagon la programo disvolviĝis laŭplane: revojaĝi al la togolanda landlima urbo Aného, iri revidi niajn esperantistajn geamikojn en Gliĝi, Kleve... kaj malkovri la ĉirkaŭaĵon de la urbo kiel vidindaĵoj de la flaŭro kaj la faŭno de la lago Togo.

En Kleve, la fratoj Dégbè kaj membroj de iliaj familioj atendis nian viziton. Momento de revido, akompanata de brakumado aŭ manpremado, de kunmanĝo de tipa manĝo loka kaj de vizito kaj malkovro de iliaj porkampaj agadoj kaj de la fiŝbreda projekto de la Esperanto-Klubo de Kleve ĉe la klubano Avoménou Kodjovi. Agossou kaj Zinsou, ambaŭ ĝisostaj esperantistoj kaj ŝtataj instruistoj, devis reveni al sia vilaĝo meze de la semajno pro ni – kutime ili revenas nur dum la semajnofinoj – por pasigi tempon kun siaj respektivaj familioj. Kia bonege memorinda tempo kun niaj gastigantoj! Danke al iliaj rilatoj, ni povis ankaŭ viziti kaj observi pli proksime la vivon ene de la vodua templo, antaŭ ol iri trinki bongustan kokossukon kaj planti arbojn, memore al nia vizito en la vilaĝo.

La postan vesperon la rendevuo estis fiksita ĉe la familio Sagbadjélou! Jam je la 17-a kaj duono du aŭtoj transportis nin tien. Kiel rapide konstruiĝis domoj ĉirkaŭ tiu de la familio! Necesis iom da tempo por retrovi la ĝustan vojon al Sagbadjélou, feliĉe! Varma brakumado, malkovro de la luprenebla parto de la domo, poste kunmanĝo arigis nin ĉiujn ĉe tablo meze de interbabiladoj! Jean-Pierre kutimis kunporti kun si bonodorajn vegetaĵojn





por donaci... Jen niaj gastigantoj povis ankaŭ ricevi verbenan arbidon por planti en la korto de sia domo. Dankon, JP!

Hodiaŭ ni rajtis fari naturistan ekskurson kaj antaŭtage rendevuo estis fiksita je la 7-a horo matene kun Loïc, la gvidisto, ĉe vojkruĉiĝo de la vilaĝo Amedehoeve. Necesis ĉ. duonhoro por atingi la rendevuejon kaj tial frue en la mateno ĉiuj ellitiĝis, pretiĝis kaj je la decidita horo ni ĉiuj enaŭtiĝis direkte al la urbo Dague. Tie, akompanate de spertaj ornitologoj, ekipitaj per binokloj, gvidiloj pri identigo de sovaĝaj birdoj, savvestoj disponigitaj de la gvidistoj kaj kun iom da fruktoj kaj akvo, jen ni enpirogiĝis por pluraj horoj, malkovrante la riĉecon de la birdfaŭno ĉe la enfluejo de la rivero Zio kun la lago Togolando, la plej granda en la lando. Kiaj impresaj pejzaĝoj, buntaj birdoj, biodiverseco... la ekskurso vere valoris la penon!

Fine ni revenis al Lomeo – ne por resti ĝis la revojaĝo hejmen de niaj geamikoj – sed por paŭzeti, ĉar jam la postan tagon dekkvarope aŭto veturigis nin al Kpalime por viziti la sapofabrikon 'kari kari' de juna entuziasma entreprenemulino, spirulinan produktadcentron en Agou. Tiu ĉi lasta specialiĝas pri la produktado kaj prilaborado de spirulino, bluverda mikroalgo kun escepta nutra konsisto. Revenante de plurtaga monaĥa mergiĝo en la monaĥejo de Dzogbégan, kie ni (re)malkovris la malsamajn kulturojn, inkluzive de la vario de "robusta" kafo, enkondukitajn en la regionon de la benediktaj monaĥoj, ni gastis ĉe Zion'Gaïa, permakultura projekto bazita sur la principoj de agroforstado. Indas ankaŭ aldoni, ke multaj el la produktaĵoj de monaĥoj surloke transformiĝas kaj komerciĝas.

Necesis reveni al Lomeo… kaj en la ĉefurbo ĉi-foje akompanate de mi, niaj gastoj vizitis la grandan bazaron, metiejon de artistoj, domojn de esperantistaj familioj, kunvenon de profesiuloj pri kuirarto, sen forgesi lasttagan viziton en IZo. Tio ĉi disvolviĝis en aparte solena etoso: tuj bonvenigis niajn kvar gastojn kaj iliajn akompanantojn paroladoj de la lerneja administracio, tamtam-ludaj prezentoj de la gelernantoj kaj iliaj instruistoj, je kies mezo okazis parolado de la ĵus nova prezidantino de la asocio «Une école au Togo», poste kunmanĝo. Al la gastoj estis donitaj ankaŭ diplomo pri ilia engaĝiĝo en la subtenado de la lernejo kaj ekzempleroj de freŝe eldonitaj libroj de ACE. Ne superfluas aldoni tion, ke Evelyne, Jean-Pierre, instigantoj de Esperanto-Plus – faka asocio de UEA de antaŭ 2 jaroj – estas ankaŭ je iniciato de la asocio "Une Ecole Togo", kiu subtenas IZo ekde 2004. Du rimarkindaj ekzemploj por kuraĝigi, ĉar ili volas esti iloj je la servo de Esperanto kaj ĝiaj internaj valoroj.

Venis fine la momento, kiam niaj vizitantoj devos reflugi al sia hejmlando. Ilia restado en Togolando finiĝis ĉi tie... emocia momento! La kunvivado finiĝis, sed ĝi daŭre skribiĝos en nia koro... Hejme aŭ survoje ni kunkune vivis komunuman vivon, malkovris multon, konatiĝis kun aferoj antaŭe ne konitaj. Apartan dankon al ili pro tio, ke ili malavare ankaŭ donis la ŝancon al pli ol unu togolandano vojaĝi kun ili por vidi kaj inspiriĝi de la pozitivaj ŝanĝoj okazantaj nuntempe en ilia lando kaj en la najbara Benino. Ni ne povas sufiĉe danki vin, karaj, pro ĉio! Via vizito kaj restado inter ni revigligis multon Esperantan tie ĉi en Togolando kaj kial ne – ankaŭ en la tuta Afriko!





# UEA kongresos en Aruŝo, Tanzanio, en 2024

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de UEA unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo, Aruŝo, estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Aruŝo mem.

Esperanto-Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Aruŝo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multhoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.

La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fiksi la datojn, lokan kongresan komitaton, temon kaj aliajn detalojn de la 109-a UK. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Kunveneja Centro, altnivela loko por internaciaj eventoj, kiu jam gastigis eventojn de UN. La Kongresa Fako kaj la Estraro de UEA kunlaboros ankaŭ kun ĉiuj partioj koncernataj de la okazigo de la UK, ĉu de la Esperanto-movado, ĉu de lokaj instancoj en Tanzanio. Jam eblas subteni la 109-an UK-on per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA: *uea.org/alighoj/donacoj/afriko*.

Indas ankaŭ aliĝi al la 108-a UK okazonta en 2023 en Torino, kiu devos kalkuli je speciala partopreno de tanzanianoj: *uk.esperanto.net/2023*. La nuna favorpreza aliĝperiodo finiĝas en la 31-a de marto 2023.


***Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 1095***



# Libro de la japana entreprenisto Etsuo Miyoshi

Lu Wunsch-Rolshoven

Multaj homoj konas la japanon Etsuo Miyoshi ĉefe kiel entuziasman batalanton por Esperanto, kiu jam survojigis multajn anoncojn subtene al Esperanto. Li estas krome sperta pri regado de entrepreno kaj ĉefe pri tio li skribis libron, kiu jam aperis en la japana originalo kaj kiel elektronika libro en la franca, la germana kaj la angla tradukoj; survojas ankaŭ Esperanto. La titolo estas: *Mia poliomjelito malŝlosas la pordon al daŭripova paco – invento, sano, lingva egaleco*.




Miyoshi rakontas pri sia familia historio, sia junaĝo, la poliomjelito, kiu damaĝis lian dekstran gambon, kaj kion li faris por povi vivi kun ĝi. Lia patro fondis gantofabrikon, kiun li poste transprenis. Post akiro de scio pri fabriktekniko, li eklernis la anglan per radioprogramo por povi vendi la gantojn tra la mondo. Li ankaŭ konstruigis fabrikojn en Koreio, Ĉinio kaj Kamboĝo por venki la severan konkurencon. Krome li establis vendokompanion en Novjorko.

Kiel mondvojaĝanta vendisto li havis la esperon, ke bastono metita al valizo povos subteni lian korpon kaj dum promenado en flughaveno kaj eĉ en la koridoro de aviadilo. Krome lia entreprena produkto, gantoj, vendeblas nur en vintro, do li bezonis printempajn kaj somerajn varojn. Tiucele li en la 90-aj jaroj konstruis bastonvalizon, sed kiam ĝi subtenis lian korpon, ĝi tuj falis flanken. Li longe ĉagreniĝis, ĝis iam meznokte li elsonĝe vekiĝis kaj la sonĝo rekomendis, ke necesas kurbigi la tenilan tubon; li tuj konstruis ekzempleron kaj ĝi ne falis, sed bone apogis lin. La kurbigita tubo movas la tenilon al la supra centro de la valizo kaj dum promenado ĉiam apogas la korpon – kontraste al bastono, kiu ne subtenas, kiam oni metas ĝin de unu loko al alia.

Li inventis la bastonvalizon "Swany Bag" por la mondo. Sed la vendado estis komence tre malfacila. Vi ĝuos en la libro, kiel li sukcesis grandigi la merkaton. Krome Miyoshi priskribas, kiel li inventis la plej malgrandan faldeblan rulseĝon "Swany Mini". Poste legeblos, kiel li travivis malsanon de renoj, per intensa fastado.

Fine la aŭtoro prezentas Esperanton, ĉar dum li grandigis siajn kompaniojn, li vizitis 30 landojn kaj lernis la anglan kaj la korean, sed tio estis nur parte sukcesa. Esperanto fine donis al li la eblon vere esprimi sin kaj havi altvalorajn spertojn en la mondo.

La libro donas multajn enrigardojn en la vivon de Japanio kaj de japanoj. Admirinda estas la energio, per kiu Etsuo Miyoshi gvidis sian entreprenon, organizis la internan strukturon kaj la laborprocesojn, survojigis la ekspansion, detaleme akompanis ĝin kaj krome eĉ kontribuis per facilpromenilo de handikapuloj.



# Ĉu survoje al nova Esperanto-urbo?

Alfons Tur Garcia

Kataluna Esperanto Asocio (KEA) kaj la magistrato de Subirats subkribas kunlaboran interkonsenton pri la havaĵo de la iama Esperanto-Muzeo kaj la ekstarigon de diversaj agadoj ligitaj al la rilato de Esperanto kaj Subirats.



Enregistriĝo de la aŭdovida materialo, maldekstre Francesc Perea, skabeno pri kulturo, dekstre Òscar Hernàndez

Kelkdek kilometrojn sude de Barcelono situas la vilaĝo Sant Pau d'Ordal (municipo de Subirats), sufiĉe konata en Esperantujo, ĉar ĝi estis dum jaroj la sidejo de la Muzeo de Esperanto, starigita de nia karmemora Lluís Hernàndez-Yzal surbaze de lia enorma privata kolekto (ĉirkaŭ 8000 libroj, 15000 revuoj, medaloj, afiŝoj kaj aliaj esperantaĵoj en kapturnaj ciferoj) kompilitaj dum lia tuta vivo, kaj kiujn li malavare disponigis ĉiam al ĉiu ajn interesito.

Post lia forpaso en 2002 la muzeo stagnis dum kelkaj jaroj, remalfermiĝis en 2010 danke al la kunlaboro kun la municipa turisma fako, tamen ĝi fine devis ĉesigi la aktivadon. Bonŝance la familio kaj la magistrato mem volis eviti ke tiu enorma havaĵo, tiom valora loke kaj internaciskale, perdiĝu, kiel bedaŭrinde okazis en aliaj lokoj, tial la municipo transprenis grandan parton de la Esperanta heredaĵo de S-ro Yzal kaj konservas ĝin en la municipa arkivo.

Dum jaroj la kataluna esperantistaro, bone konanta la gravecon de tiu heredaĵo, klopodis kunlabori en ĝiaj konserviĝo kaj diskonigo, sed mankis la rimedoj por doni novan vivon al tiu riĉaĵo. Kvankam Subirats estas malgranda urbeto (iom pli ol 3000 loĝantoj), la tiea magistrato plene konsciis pri la aparta valoro de la ligiteco de la vilaĝo al Esperanto kaj tial ĝi ekiniciatis projekton nomatan Espai-Esperanto (Esperanto-spaco), kiu celas montri la rilaton de la municipo al la internacia lingvo, ĝian historian enkadriĝon kaj la personan engaĝiĝon de S-ro Yzal. Tiu Esperanto-spaco, ekspozicio de diversaj Esperantaj grafikaj materialoj, aŭdovida prezento kaj ateliero disponota al diversaj kulturaj aktivadoj, okupos tutan renovigitan halon apud la urbodomo, kiu jam estas konstruata kaj inaŭguriĝos espereble iam antaŭ la jarfino. Ne temas do, pri ebleco aŭ surpapera projekto, sed pri jam nun tuŝebla realo.

KEA atenteme sekvis kaj kunlaboris de ĉiam en la afero, pruvo de tio estas ke ĝi komisiis al unu el siaj estraranoj la respondecon pri la asociaj rilatoj kun Subirats. Kadre de tiu kunlaboro okazis prezento de Esperanto en la foiro Subirats Tasta'l (Subirats gustumu ĝin) fine de la pasinta novembro, kaj ankaŭ parto de la eventoj de la Zamenhof-tago okazis en Subirats. Sed la graveco de la projekto postulis oficialigi tiun partnerecon. Tial la pasintan 11-an de marto la Urbestro de Subirats, S-ro Pere Pons, kaj S-ro Òscar Puig, prezidanto de KEA, subskribis interkonsentan dokumenton. Dum tiu tago la ĉeestantaj estraranoj de KEA kaj KEJ (Kataluna Esperanto-Junularo) krom viziti la fizikan ejon de la Esperanto-spaco partoprenis la enregistriĝon de la aŭdovida materialo, kiu spekteblos de ĉiuj vizitontoj de tiu nova projekto kiu nun estas unu-nura, sed kiu povas esti mejloŝtono kaj modelo por aliaj similaj agadoj, kiuj valorigu nian movadan havaĵon kaj pasintecon kiel saltotabulo al agado en la nuntempo kaj cele al la estonteco.


La interkonsento inter KEA kaj la municipo. De dekstre maldekstren: Francesc Perea, Skabeno pri kulturo, Àngels Pinyol, Skabeno pri Turismo, Òscar Puig kaj fine mi mem

# Riĉa programo por IKU/SK 2023, James Webb skuas nian komprenon de la praeksplodo kaj intervjuo pri la plej grandaj enigmoj de la universo

Amri Wandel

La Internacia Kongresa Universitato kaj Scienca Kafejo en Torino proponos pli ol 20 prelegojn, preskaŭ same kiel la rekorda IKU en Lillo. Astronomoj uzis la James Webb-teleskopon por rigardi reen en la tempo al la frua universo kaj trovis ion tute ne atenditan, kiu minacas skui la teorion de la praeksplodo. En intervjuo al Retradio Amri Wandel respondas pri la Fina Teorio kiun vane serĉis Einstein, la kosmaj enigmoj pri la malhelaj materio kaj energio, pri la homa daŭripovo kaj klimatŝanĝiĝo kaj pri ekstertera vivo.

## IKU kaj Scienca Kafejo en Torino – plej riĉaj post 2015

Post pluraj magraj jaroj pro la pandemio, la ĉi-jara rikolto de la *Internacia Kongresa Universitato (IKU)* denove superis dudekon da altkvalitaj proponoj, el kiuj la 5-persona IKU-komisiono (S. Fiedler, J. Wen, M. Maitzen, J.A. Vergara kaj A. Wandel) rekomendis naŭ por IKU (el ili 3 AIS-kursoj) kaj dek por Scienca Kafejo (SK; du sesioj de po 5 prelegoj), kion la Estraro de UEA aprobis en sia marta kunsido. La distribuo de temoj: 4 pri fiziko, kemio aŭ astronomio, 3 pri lingvistiko, 3 pri Esperantologio, 2 pri literaturo. El la 8 ceteraj prelegoj 2 estas pri natursciencoj (Ekologio kaj robotiko) kaj la aliaj pri sociaj sciencoj. Ĉiuj temoj kaj prelegantoj aperas en la apuda tabelo. Ĉiuj resumoj estas videblaj en la IKU-paĝo *https://uea.org/teko/IKU/2023*.

Aldone okazos en Torino la disdono de Premio Pirlot, por la plej bonaj sciencaj libroj, artikoloj kaj prelegoj en la lastaj jaroj. Estos aljuĝataj ĝis tri premioj en ĉiu branĉo. La sumo de la premioj estos ĉ. 500 eŭroj. Proponojn bv. sendi al *renato(ĉe)esperanto.org* ĝis la fino de junio 2023.

**Kodo kolora:** AIS | IKU | SK 1 | SK 2

| Preleganto | Temo | Tipo | Titolo |
|---|---|---|---|
| Baláž Peter | Robotiko | SK1 | Robotoj alvenas: aŭtomatigo, artefarita intelekto, minaco de senlabora estonto |
| Barandowská-Frank Vera | Lingvistiko | IKU | Internacia kunfluo de valoroj: Torino kaj Academia pro Interlingua |
| Butan Maria | Psikologio | SK2 | La Atendo - lernenda leciono |
| Dawson Chris | Politiko | SK2 | Nuntempaj projektoj kaj ŝancoj de mondregeco |
| Eckert Denis | Esperantologio | SK2 | La unuaj manlibroj kaj vortaroj de la Esperanto-movado |
| Fontaine Joel | Fiziko | SK2 | Danĝera lumo |
| Goes Heidi | Lingvistiko | AIS | La kikonga lingvaro |
| Goodall Grant | Lingvistiko | IKU | Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo |
| Jacobsen Jesper | Fiziko | AIS | Kvantuma interplektiteco: la mistera gluo de la kvantuma mondo |
| Labrie Gabriel | Sociologio | AIS | Lingva pejzaĝo en lingve diversecaj urboj: esplorkampo de socilingvistiko |
| Lindstedt Jouko | Literaturo | SK1 | G. J. Ramstedt kaj liaj memoraĵoj el Azio |
| Lo Jacomo François | Matematiko | SK2 | La matematikaj kalkuliloj |
| Pennacchietti Fabrizio | Esperantologio | IKU | La DNA de Esperanto |
| Raola Orlando | Kemio | SK1 | Fizikaj kaj kemiaj karakterizoj de gemoj |
| So Gilsu | Ekologio | IKU | Klimata Ŝanĝo kaj Hidrogena Ekonomio |
| Tarracchini Ermanno | Pedagogio | SK1 | De la pedagogio ĝis la neŭropedagogio |
| Tonkin Humphrey | Literaturo | IKU | Boulton – Ŝekspiro – Koriolano |
| Tuider Bernhard | Esperantologio | SK1 | La arkivo de Universala Esperanto Asocio |
| Wandel Amri | Astronomio | IKU | Novaĵoj pri la Serĉo de Ekstertera Vivo: eksterplanedoj, NIFOj kaj SETI |

## Novaj observoj de James Webb minacas kaŭzi kosman revolucion

La spacteleskopo James Webb malkaŝis ses masivajn galaksiojn, kiuj ekzistis inter 500 kaj 700 milionoj da jaroj post la praeksplodo (nome, tre proksime al la naskiĝo de la unuaj steloj kaj galaksioj). La malkovro tute renversas ekzistantajn teoriojn pri la originoj de galaksioj, laŭ nova studo publikigita la 22.02.2023 en la revuo *Nature* kaj intervjuo en CNN (*https://mallonge.net/xk*) kun la aŭtoroj.

"Ĉi tiuj objektoj havas multe pli grandajn masojn ol iu ajn atendis," diris en gazetara konferenco unu el la ĉefaŭtoroj de la esploro, Joel Leja, profesoro pri astronomio kaj astrofiziko ĉe Penn State University. "Ni atendis trovi nur etajn, junajn, bebajn galaksiojn tiuepoke, sed ni malkovris galaksiojn same maturajn kiel la hodiaŭaj."

La teleskopo observas la universon en infraruĝa lumo, kiu estas nevidebla por la homa okulo, kaj kapablas detekti la malfortan lumon de antikvaj steloj kaj galaksioj. Rigardante en la fruan, malproksiman universon, James Webb povas esence vidi reen en la tempo ĝis antaŭ ĉirkaŭ 13,5 miliardoj da jaroj. (Laŭ la plej lastaj observoj kaj teorioj la sciencistoj asertas ke la universo aĝas proksimume 13,8 miliardojn da jaroj).

"Se amasa galaksia formado komenciĝis tiom frue en la historio de la universo, ni devas rezigni pri la nuna teorio de la praeksplodo,  kiu ĝis nun estis preskaŭ unuanime akceptita" diris Leja. La galaksioj estas tiom masivaj ke ili konfliktas kun 99% de la modeloj reprezentantaj fruajn galaksiojn en la universo, kio devigos la sciencistojn modifi siajn teoriojn pri tio kiel galaksioj formiĝis kaj evoluis. La nuna teorio sugestas ke galaksioj komenciĝis kiel malgrandaj nuboj de steloj kaj polvo kiuj kreskis kun la tempo.

"Ni rigardis en la tre fruan universon por la unua fojo kaj havis neniun ideon kion ni trovos," Leja diris. "Ni trovis ion tiel neatenditan, ke ĝi efektive kreas problemojn por la scienco. Ĝi pridubigas la tutan bildon de frua galaksioformado."

Leja kaj liaj kolegoj komencis analizi Webb-datenojn, kune kun la unuaj alt-rezoluciaj bildoj de la teleskopo, post kiam ili estis publikigitaj en julio 2022. La galaksioj aperis kiel grandaj lumpunktoj, kaj la teamo estis surprizita vidante ilin – tiel surprizite, ili opiniis ke ili faris eraron interpretante la datumojn. "Kiam ni analizis la datumojn, ĉi tiuj amasaj galaksioj aperis tre rapide," diris Leja. "Ni provis eltrovi kio ili estas, ĉar ili estis tiel grandaj kaj brilaj. Mia unua penso estis, ke ni faris eraron. Sed ni ankoraŭ ne trovis eraron, malgraŭ multaj provoj."

"Unu maniero konstati kial la galaksioj kreskis tiel rapide, estas preni spektran bildon de la galaksioj, kio implicas dividi lumon en malsamajn ondolongojn, kio ankaŭ helpos taksi la veran distancon de la galaksioj", diris Leja. La spektroskopio-datenoj disponigus pli detalan rigardon al la galaksioj kaj ilia impona grandeco. "Spektro tuj diros al ni ĉu jes aŭ ne ĉi tiuj aferoj estas realaj," diris Leja. "Ĝi montros al ni kiom grandaj kaj malproksimaj ili estas. Efektive ni jam havas kion ni esperis lerni de James Webb, sed ni trovis ion, pri kio ni neniam pensis demandi la universon – kaj ĝi okazis multe pli rapide ol mi pensis."

Ankaŭ eblas, ke la galaksioj identigitaj kun Webb-datumoj estas fakte io tute alia. "Ĉi tio estas nia unua ekvido ĝis nun, do gravas, ke ni konservu malferman menson pri tio, kion ni vidas," diris Leja. "Kvankam la datumoj indikas, ke ili estas verŝajnaj galaksioj, povas esti ke kelkaj el ĉi tiuj objektoj montriĝos esti obskuritaj supermasaj nigraj truoj. Ĉiaokaze, la kvanto da maso, kiun ni malkovris, signifas, ke la konata maso en steloj en ĉi tiu periodo de nia universo estas ĝis 100-oble pli granda ol ni antaŭe pensis.



Astronomoj taksas, ke 50 000 fontoj de infraruĝa lumo estas reprezentitaj en ĉi tiu bildo de la NASA-Eŭropa-Kanada James Webb-Spacteleskopo.

## Wandel pri Einstein, malhela energio kaj ceteraj kosmaj enigmoj




*Amri kun la intervjuantoj Franziska Dodik kaj Anton Oberndorfer (maldekstre) kaj la estro de la E-muzeo en Vieno, Bernhard Tuider. Foto: Alfred Heiligenbrunner*

Okaze de sia lastatempa vizito en la Viena Internacia Esperanto-Muzeo, la vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri Faka kaj Scienca agado Amri Wandel estis intervjuita de Retradio pri pluraj temoj rilataj al lia profesio. La intervjuo estas spektebla kaj legebla en tri partoj po ĉ. dekminutaj.

En la unua parto (*https://mallonge.net/xl*) li parolis pri la daŭripovo de la homaro sur nia planedo kaj pri la estonta ekspluatado de la spaco.

La dua parto (*https://mallonge.net/xm*) temis pri ekstertera vivo kaj inteligenteco.

La tria parto (*https://mallonge.net/xn*) traktis la plej profundajn demandojn de la moderna fiziko kaj kosmologio:

la Fina Teorio, kiun Einstein provis vane trovi, malhela materio kaj malhela energio, sed ankaŭ surteraj problemoj kiel nia rolo en la klimatkrizo.

Post la intervjuo Amri daŭrigis la kosman temon vizitante la historian observatorion de Vieno kun la siatempe plej granda lensa teleskopo de la mondo (apuda foto), kie li renkontiĝis kun sia kolego el la departemento de Astronomio en la Universitato de Vieno, prof. Hans Michael Maitzen. Maitzen, vicprezidanto de AIS kaj UEA-reprezentanto ĉe Unesko en Vieno, prezentis sian novan libron *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado* pri la aŭstra sciencisto Boltzmann, kunverkitan kun Reinhard Foessmeyer kaj aperintan fine de 2022.



## Finna tagĵurnalo citas la esploron pri eksterteraj civilizacioj

Lastatempe (07.03.2023) aperis artikolo pri la esploro de A. Wandel (Esperanto 2023:3 p.66) en la plej granda ĵurnalo de Finnlando, ”Helsingin Sanomat”, kun proksimume 700 mil legantoj ĉiutage (*https://www.hs.fi/tiede/art-2000009397760.html*). La sama teksto aperis antaŭe en la popularscienca finna revuo ”Tiede”.

La papera versio havis la titolon ”Fremda inteligenteco ne trovas nin”, dum la reta versio elektis pli longan titolon: ”Oni kredus, ke en la kosmo svarmas inteligenta vivo, sed kial ni nenion scias pri ĝi? Esploristo havas malvarman [sobran] klarigon por tio". Dankon al Jouko Lindstedt pro la trovo kaj traduko.








Al nia stoko de brokantaĵoj konstante aldoniĝas novaj (malnovaj) varoj.
Vi trovas ilin en la sekcio por brokantaĵoj en *katalogo.uea.org*.

# Bahaa Esperanto-Ligo 50-jara

Bernhard Westerhoff

La 19-a de marto 2023 markas la 50-an datrevenon de la fondo de Bahaa Esperanto-Ligo.

La starigon de BEL iniciatis grupeto de bahaanoj kolektiĝintaj dum la UK en 1972 en Portland, Usono. Ili submetis tiucelan proponon al la Universala Domo de Justeco, la supera internacia gvidorgano de la Bahaa Kredo, kiu en marto 1973 donis sian oficialan aprobon. De tiam BEL kunordigas la kunlaboron inter la bahaa ko-



*La iniciatintoj de BEL kunvenas dum la UK 1972 en Portland, Usono*

munumo kaj la Esperanto-movado. La Ligo iom post iom kreis por si firman fundamenton, solide disvolviĝadis kaj tra la duonjarcento povis fieri pri kelkaj gravaj atingoj. Tiel BEL dekomence eldonas, nun jam de multaj jaroj regule dufoje jare, membrobultenon *La BELmonda Letero*, flegas informriĉan retejon *https://bel.bahai.de/*, regule reprezentas la Kredon ĉe UK-oj kaj aliaj gravaj Esperanto-eventoj, averaĝe ĉiujare eldonas ion pri la Kredo en Esperanto kaj dum la lastaj jaroj ankaŭ subtitoligis 4 unuhorajn filmojn pri la centraj personecoj, celoj kaj disvolviĝo de la Kredo (vidu la retejon sub "literaturo" kaj *https://bel.bahai.de/4filmoj/*), informas la bahaan komunumon pri la evoluo de Esperanto, aranĝas ĉiumonatajn virtualajn membrokunvenojn, ktp. Nuntempe en la Ligo, kiu jam de 1975 oficiale estas kunlaboranta faka asocio de UEA, membras iom pli ol 200 anoj, kiuj vivas en pli ol 50 landoj.

La Universala Domo de Justeco sendigis jenan gratulon al BEL: "La Domo de Justeco ĝoje konstatas la daŭran kunagadon de la Ligo kun aliaj, kiuj konsideras komunan lingvon esti kanalo por krei reciprokan interkompreniĝon inter la popoloj de la mondo. … Estas … ĝi efektive delonga ligo inter la principoj de la Kredo kaj esperantistaj samideanoj tra la mondo. Estas la espero, ke pli kaj pli da similpensantoj kuniĝos kun la membroj de la Ligo kiel protagonistoj de larĝa vizio pri la unueco de la homaro."

Kaj UEA gratulis jenavorte: "Universala Esperanto-Asocio kore gratulas vin kiel longtempan, persistan kaj aktivan Fakan Asocion… Estante unu el la aktivaj Fakaj Asocioj vi estas bone konata de esperantistoj, kaj ni deziras ke BEL plu agadu kaj prezentu sin dum Universalaj kaj Virtualaj Kongresoj de UEA... Samtempe ni fidas ke BEL plu agadas por disvastigi la konon pri Esperanto inter aliaj grupoj kaj komunumoj ene de la Bahaa Religio tra la mondo kaj deziras sukceson en tiu aktiveco."


Okaze de sia jubileo BEL eldonas Esperanto-tradukon de *Dio preterpasas* (God Passes By en la originala angla), la aŭtoritata preskaŭ 500-paĝa historio de la unuaj cent jaroj de la Kredo, verkita de Shoghi Effendi, pranepo de la Fondinto de la Kredo kaj dum 1921-1957 ĝia Gardanto. Krome ĝi planas informi la bahaajn instituciojn pri sia duonjarcenta disvolviĝo kaj pri la stato de la lingvo Esperanto kaj ĝia movado kaj tiucele eldonos novan broŝuron anglalingvan kun traduko; kaj ankoraŭ pliaj aktivaĵoj konsideratas por la jubilea jaro.

La Bahaa Kredo, fondita de Bahá'u'lláh meze de la 19-a jarcento, baziĝas sur la konvinko pri la unueco de Dio, de la religio kaj de la homaro. Ĝi




*Kunveno de esperantistoj, BELanoj kaj bahaanoj dum la UK 2018 en Lisbono, Portugalio*

havas inter siaj bazaj principoj la realigon de ĉi tiu unueco per rimedoj inkluzivantaj la adopton de universala helpa lingvo kaj i.a. ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj organoj pledas por tiuj principoj. Bahaanoj apartenas al preskaŭ ĉiuj etnoj kaj vivas en preskaŭ ĉiuj anguloj de la tero. Ili ĉie tra la mondo strebas krei bazdemokratajn komunumojn malfermajn por ĉiuj; tiuj formas unikan tutmondan organizaĵon surbaze de la principo de unueco en diverseco kaj tiel modelon de unuigita, paca, prospera tutmonda socio.




*Eldonaĵo de BEL*

## Francisco Jesús Briel de Cañas (14.01.1940 – 05.03.2023)

Francisco Jesús Briel de Cañas (Havano, 14.01.1940), inĝeniero, Honora Membro de Kuba Esperanto-Asocio (KEA) ekde 2015, forpasis en Havano la 5-an de marto 2023. Li eklernis Esperanton 1965 en Lepsiko (Germana Demokratia Respubliko) kaj daŭrigis la lernadon en Havano (1968). Li estis fondinto de Havana Esperanto-Grupo (novembro 1971) kaj membro de Havana Esperanto-Rondo (decembro 1972 – junio 1974). En 1972 li fariĝis individua membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj ekde septembro 1979 membro de KEA. Dum la 80-aj jaroj li membris en la Estraro de KEA kiel respondeculo pri interna organizo kaj kune kun siaj edzino kaj filo, ambaŭ aktivaj esperantistoj, partoprenis ĉiujn kongresojn de KEA (1987, 1996, 1999, 2002, 2005, 2015), la Internacian Konferencon Esperanto '88, la 23-an ILEI-Konferencon (Hanabanilla, 1990), la du UK-ojn, kiuj okazis en Havano (1990, kiel LKK-ano, kaj 2010), la 6-an kaj 9-an Tutamerikajn Kongresojn de Esperanto (Havano, 2004, 2018). Ekde 2001 li estis direktoro (por Latinameriko) de Monda Yumeiho-Societo, kaj fakdelegito de UEA.

## Halina Komar (18.10.1937 – 14.02.2023)

La 14-an de februaro 2023 forpasis eminenta pola esperantistino Halina Komar.

Ŝi estis longjara, eksterordinare aktiva membro de la Esperanta movado, fondinto de Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz. Inter 2007 kaj 2011 ŝi estis la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio.

En ŝia laboro dominis internaciaj kaj lokaj projektoj, en kiuj partoprenis grandaj, sociaj grupoj, precipe maljunuloj. Pro sia escepta laboro kaj dediĉo en 2017 ŝi ricevis La Oran Krucon de Merito.

Halina Komar estis membro de UEA kaj Komitatano A por Pollando 2008–2011.



La funebra ceremonio okazis la 17-an de februaro en la tombeja kapelo en Nowy Sącz-Biegonice.

*Nome de Centro de Interkultura Edukado*
*Bożena Kocyk*




# Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe *https://uea.org/alighoj*

# LA MEMBRARO DE UEA EN 2022

| Lando | AM | IM | Sume |
|---|---|---|---|
| Afganio | 0 | 1 | 1 |
| Albanio | 20 | 10 | 30 |
| Alĝerio | 0 | 3 | 3 |
| Angolo | 0 | 5 | 5 |
| Argentino | 75 | 34 | 109 |
| Armenio | 25 | 10 | 35 |
| Aŭstralio | 85 | 28 | 113 |
| Aŭstrio | 57 | 38 | 95 |
| Bangladeŝo | 0 | 1 | 1 |
| Belgio | 211 | 94 | 305 |
| Belorusio | 0 | 6 | 6 |
| Benino | 30 | 43 | 73 |
| Birmo | 0 | 1 | 1 |
| Bolivio | 0 | 7 | 7 |
| Bosnio-Hercegovino | 80 | 9 | 89 |
| Brazilo | 0 | 290 | 290 |
| Britio | 247 | 95 | 342 |
| - Ĝibraltaro | 0 | 1 | 1 |
| Bulgario | 100 | 52 | 152 |
| Burkino | 0 | 1 | 1 |
| Burundo | 340 | 55 | 395 |
| Centr-Afrika Resp. | 0 | 1 | 1 |
| Ĉado | 0 | 3 | 3 |
| Ĉeĥio | 50 | 40 | 90 |
| Ĉilio | 35 | 17 | 52 |
| Ĉinio | 1275 | 136 | 1411 |
| - Honkongo | 0 | 3 | 3 |
| - Tajvano | 0 | 4 | 4 |
| Danio | 52 | 65 | 117 |
| Dominika Resp. | 0 | 11 | 11 |
| Ebur-Bordo | 0 | 3 | 3 |
| Egiptio | 0 | 3 | 3 |
| Ekvadoro | 0 | 4 | 4 |
| Estonio | 0 | 9 | 9 |
| Etiopio | 0 | 2 | 2 |
| Filipinoj | 0 | 17 | 17 |
| Finnlando | 105 | 69 | 174 |
| Francio | 376 | 337 | 713 |
| - Reunio | 0 | 2 | 2 |
| Gabono | 0 | 1 | 1 |
| Ganao | 0 | 10 | 10 |
| Germanio | 474 | 395 | 869 |
| Grekio | 36 | 8 | 44 |
| Gvatemalo | 0 | 5 | 5 |
| Gvineo | 0 | 1 | 1 |
| Hinda Unio | 35 | 46 | 81 |
| Hispanio | 177 | 151 | 328 |
| Honduro | 0 | 2 | 2 |
| Hungario | 103 | 58 | 161 |
| Indonezio | 35 | 48 | 83 |
| Irano | 79 | 51 | 130 |
| Irlando | 4 | 10 | 14 |
| Islando | 13 | 10 | 23 |
| Israelo | 85 | 45 | 130 |
| Italio | 433 | 101 | 534 |
| Japanio | 753 | 222 | 975 |
| Kamboĝo | 0 | 3 | 3 |
| Kameruno | 0 | 3 | 3 |
| Kanado | 42 | 95 | 137 |
| Kartvelio | 20 | 1 | 21 |
| Kazaĥio | 0 | 5 | 5 |
| Kenjo | 0 | 21 | 21 |
| Kolombio | 33 | 139 | 172 |
| Komoroj | 0 | 2 | 2 |
| Kongo (Dem. Resp.) | 20 | 116 | 136 |
| Kongo (Resp.) | 0 | 1 | 1 |
| Korea Resp. | 235 | 79 | 314 |
| Kostariko | 25 | 6 | 31 |
| Kroatio | 94 | 18 | 112 |
| Kubo | 419 | 32 | 451 |
| Kuvajto | 0 | 1 | 1 |
| Latvio | 88 | 10 | 98 |
| Litovio | 100 | 19 | 119 |
| Luksemburgo | 90 | 16 | 106 |
| Madagaskaro | 45 | 12 | 57 |
| Malajzio | 0 | 1 | 1 |
| Malio | 0 | 2 | 2 |
| Malto | 0 | 2 | 2 |
| Maroko | 0 | 5 | 5 |
| Maŭricio | 0 | 1 | 1 |
| Meksiko | 74 | 88 | 162 |
| Mongolio | 35 | 5 | 40 |
| Nederlando | 118 | 134 | 252 |
| Nepalo | 50 | 26 | 76 |
| Niĝerio | 25 | 3 | 28 |
| Niĝero | 0 | 2 | 2 |
| Nikaragvo | 0 | 5 | 5 |
| Norda Makedonio | 20 | 4 | 24 |
| Norvegio | 92 | 22 | 114 |
| Nov-Zelando | 18 | 16 | 34 |
| Orienta Timoro | 0 | 4 | 4 |
| Pakistano | 30 | 25 | 55 |
| Palestino | 0 | 1 | 1 |
| Paragvajo | 0 | 4 | 4 |
| Peruo | 35 | 20 | 55 |
| Pollando | 190 | 82 | 272 |
| Portugalio | 36 | 9 | 45 |
| Ruando | 0 | 2 | 2 |
| Rumanio | 5 | 33 | 38 |
| Rusio | 136 | 62 | 198 |
| Salvadoro | 0 | 4 | 4 |
| Senegalo | 0 | 36 | 36 |
| Serbio | 60 | 21 | 81 |
| Singapuro | 0 | 2 | 2 |
| Sirio | 0 | 1 | 1 |
| Slovakio | 22 | 24 | 46 |
| Slovenio | 100 | 12 | 112 |
| Srilanko | 0 | 1 | 1 |
| Sud-Afriko | 13 | 5 | 18 |
| Svedio | 180 | 66 | 246 |
| Svislando | 120 | 63 | 183 |
| Taĝikio | 20 | 1 | 21 |
| Tajlando | 0 | 5 | 5 |
| Tanzanio | 0 | 32 | 32 |
| Togolando | 25 | 24 | 49 |
| Tunizio | 0 | 1 | 1 |
| Turkio | 0 | 8 | 8 |
| Ugando | 0 | 11 | 11 |
| Ukrainio | 35 | 66 | 101 |
| Urugvajo | 17 | 12 | 29 |
| Usono | 330 | 277 | 607 |
| Uzbekio | 0 | 2 | 2 |
| Venezuelo | 21 | 28 | 49 |
| Vjetnamio | 103 | 36 | 139 |
| Zambio | 0 | 1 | 1 |
| Zimbabvo | 0 | 2 | 2 |
| 126 landoj kaj teritorioj | 8511 | 4552 | 13063 |

## LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

| Kategorio | 2021 | 2022 |
|---|---|---|
| Membro-Gvidlibro | 5 | 4 |
| Membro Baza | 1606 | 1686 |
| Membro-Abonanto | 906 | 830 |
| Juna Membro-Gvidlibro | - | - |
| Juna Membro Baza | 795 | 942 |
| Juna Membro-Abonanto | 90 | 67 |
| Dumviva Membro Abonanto | 670 | 658 |
| Juna Dumviva Membro Abonanto | 20 | 21 |
| Dumviva Membro Baza | 264 | 281 |
| Juna Dumviva Membro Baza | 31 | 28 |
| Honora Membro | 27 | 25 |
| Honora Patrono | 10 | 10 |
| **INDIVIDUAJ MEMBROJ** | **4424** | **4552** |
| Aligitaj membroj | 7298 | 7285 |
| Junaj aligitaj membroj | 1224 | 1226 |
| **MEMBROJ ENTUTE** | **12946** | **13063** |
| Dumvivaj Patronoj | 2 | 2 |
| Societo Zamenhof | 108 | 96 |
| Abonoj Esperanto | 41 | 31 |
| Kolektivaj ab. Esperanto | - | - |
| Abonoj Kontakto | 159 | 159 |
| Kolektivaj ab. Kontakto | - | - |
| Patronoj de TEJO | 60 | 65 |
| Dumvivaj Patr. de TEJO | 22 | 22 |
| **Kotizoj entute** | **13338** | **13438** |

*En 2022 4552 homoj estis individuaj membroj (IM) de UEA (4424 en 2021, +128); 1058 ankaŭ estis de TEJO (936 en 2021, +122). Tiuj membroj venas el 126 landoj kaj teritorioj: plej multe el Germanio, Francio, Brazilo, Usono kaj Japanio, same kiel en la lastaj jaroj. Landoj (re)aperintaj estas: Maŭricio, Srilanko kaj Zimbabvo.*

*Ricevis papere kiel IM-oj la revuon Esperanto 1611 (1723 en 2021, -112) kaj la revuon Kontakto 88 IM-oj (110 en 2021, -22). Aldone estis 33 nemembraj abonantoj de Esperanto (43 en 2021, -10) kaj 246 nemembraj abonantoj de Kontakto (241 en 2021, +5).*

*Aligitaj membroj (AM) estis 8511 (8522 en 2021, -11), el kiuj estis junaj (TEJO) 1226 (1224 en 2021, +2). Tiel la tuta membraro (IM+AM) de UEA en 2022 estis 13063: eta kresko kompare kun 2021 (12946 en 2021, +117).*

*UEA dankas al siaj membroj pro la subteno. Por re-aliĝi en 2023 aliru: https://uea.org/alighoj/alighilo.*

# Voĉlegitaj versioj

La revuo *Esperanto* estas voĉlegata. Voĉlegitajn versiojn povas elŝuti individuaj membroj de UEA en la retejo de la Asocio.






*https://uea.org/revuoj/sono*

Voĉlegita *Esperanto*



**Sekvu kaj abonu la Gazetarajn Komunikojn de UEA por informiĝi pri freŝaj novaĵoj ĉe:**

***https://uea.org/aktuale/komunikoj***